La Senata Sekretario - kondiĉe, ke la sesio efektiviĝos - transprenos formalajn taskojn kaj la administran flankon dum la studadsesio en Berlin dum la UK.

Pro la peto de kol. Fößmeier senŝarĝigi lin de la respondeco pri la aperigo de la eldonserio de AIS „Acta Sanmarinensia", kol. Holdgrün montriĝis preta transpreni la respondecon por tiu tasko kondiĉe, ke la ĝisnuna zorganto tion akceptos (kio okazis). Ekde tiam kontraktoj por novaj volumoj estos pritraktendaj jam kun kol. Holdgrün, al kiu kol. Frank sendos la kaj jam surpresitajn volumkovraĵojn de volumo 3 kaj nur blua-blankajn - por la venontaj volumoj de la "Acta".

La senato decidis, ke kol. Holdgrün transprenu la redaktadon, zorgu pri prijuĝanta la kvaliton (ĉefe sciencan, lingvan) de ĉiu kontribuo komitato, kiu ekzemple povas konsisti el la koncerna dekano, la redaktanto kaj iu tria kompetenta persono. La finan decidon havas la redaktanto. Li zorgas ankaŭ pri adekvata kaj unueca aspekto de la presotaj tekstoj.

Kol. Minnaja proponis, ke en la latina titolo estu interŝanĝitaj la du lastaj vortoj, ĝi do tekstu nun: „Acta Sanmarinensia Academiae Internationalis Scientiarum". Tiun proponon la senato akceptis per (4:0:0) voĉoj. Krome li proponas esplori la eblecon pri recenzado de la revuo; en tio subtenu lin la redaktanto.

La filino de kol. Tyblewski, Mag. Tyblewska-Kundzicz informis la prezidanton pri la ankoraŭ troviĝanta hejme stako da libroj de Acta Sanmarinensia. AIS ne povas aĉeti la restantajn librojn, petas tamen pri listo de la postrestintaj kajeroj. La aŭtoroj de jam antaŭpagitaj kaj ankoraŭ ne ricevitaj ekzempleroj memstare kontaktiĝu kun Mag. Tyblewska-Kundzicz. Laŭ siatempa decido, al AIS estas ankoraŭ ĉiukaze transdonendaj po 10 ekzempleroj de ĉiu titolo. Post la distribuo de jam antaŭpagitaj ekzempleroj ŝi povas memstare disponi pri la resta stako. La postlasitajn presoriginalojn ŝi bv. transdoni al kol. Holdgrün, kiu post konfirmo pri la retiriĝo de kol. Fößmeier ekde nun zorgos pri eldonaĵoj de AIS.

6. *Klerig-ofico / KleO (Quednau, Fößmeier)*
La senato korektis la programon de la 20a SUS aprobante la subajn 2 kursojn validaj kiel SUS-kursoj: en la kvina sekcio „Unua helpo en turismo" de OProf. Quednau/ADoc. A. Lewanderska-Quednau, kaj „Turisma geografio de la mondo" de OProf. R. Mielcarek (sesa sekcio).

Krome la senato sciigis, ke la kurso de kol. Frank pri "Klerigkibernetikaj kontribuoj por la planado kaj realigado de kursaro pri eŭrologio" kaj la kurso de kol. Minnaja pri "Transnacieco en la scienco: profesoroj kaj studentoj tra la mondo" validu kiel SUS-kursoj en la sesa sekcio.

Rilate studentajn legitimilojn de AIS la senato starigis novajn kondiĉojn validajn ekde post SUS20 en Bydgoszcz:

--- por finekzamenoj ĉiu ekzamenato devas havi aŭ havinti (tio signifas, ke ne estas necese, ke la iam por difinita studadcelo akirita legitimilo ankoraŭ validas) studentan legitimilon validan aŭ validintan por la koncerna ekzamenŝtupo atestita sur ĝi;

--- la validecdaŭro por nove akirita studenta legitimilo estu kvin jaroj, t.e. ĝi estas en la eldonjaro valida ek de la eldondato kaj krome la venontajn kvar kalendarajn jarojn; la validecdaŭro de la antaŭ aŭ dum SUS20 jam eldonitaj legitimiloj pro tiuj ĉi novaj kondiĉoj ne ŝanĝiĝas; studenta legitimilo validas maksimume ĝis la koncerna sukcese trapasita ekzameno;

--- posedado de valida studenta legitimilo reduktas la dum SUS pagendajn kotizojn je 0,5 AKU (t.e. aliĝante ĝustatempe krom aliĝkotizo oni povas ankoraŭ per la restantaj 0,2 AKU pagi alian kotizon *dum la sama SUS*, ekzemple parton de kurskotizo);

--- aliĝo okazu laŭ la ĝis nunaj kondiĉoj.

Ĉiuj aliaj kondiĉoj, kiuj per la nunaj decidoj ne estis ŝanĝitaj, restas validaj. La senato substrekis, ke per la nuna klaŭzo la kondiĉoj por studentoj estas multe pli favoraj, aliflanke la senato atentigas, ke tiuj kondiĉoj estos strikte aplikataj.

7. *Protokol-ofico / ProtO (Lewoc, Holdgrün)*
La Senata Sekretario transdonis al la prezidanto la originalojn de la senatprotokoloj de la deĵorperiodo 1996-1999 (krom la 36a kaj 37a, el Zvenigorod (RUS) resp. el Montpellier (F)), por la protokollibro. Tiuj protokoloj estas jam aprobitaj de la senato kaj legeblaj en la reto sub la adreso: ftp://ftp.uni-math.gwdg.de/pub/ILo/AIS/protokoloj/senato. La limdato por la anonciĝoj de kursoj kaj prelegoj por la 21a SUS pasis fine de marto 1999. Kol. Lewoc informis pri la planita scienca programo por tiu SUS, dum kiu okazos la jenaj kursoj:
1a sekcio: Lernstirado kaj lernregulado (prof. Frank);
2a sekcio: Ĉeneroj por historio de la e-literaturo (prof. Minnaja); kurso de prof. Pennacchieti (la titolo ankoraŭ sciigenda);
3a sekcio: Nombroteoriaj perloj (prof. Holdgrün);
5a sekcio: Nia Galaksio - La Lakta Vojo (prof. Maitzen);
6a sekcio: Aplikado de aŭdvidaj kaj plurkanalaj rimedoj en instruado (prof. Quednau/doc. Lewanderska-Quednau).
La kurso sub la titolo *Steloj en la „Metamorfozoj" de Ovidio, kaj ilia ĉiela naturo (doc. Barandovská-Frank/prof. Maitzen)* validas nur kiel krom SUS-kurso.
La senato priparolis ankaŭ la kadran programon de la sesio kaj tempajn eblojn por kursoj kaj oficialaj kunsidoj, kaj decidis pri la programo dum SUS21 en Rimini/San Marino jene: La Senata Sekretario provu starigi pli kompaktan programon mallongigante la paŭzojn, por ke ĉiuj kursoj povu okazi laŭeble antaŭtagmeze. La kursoduopoj de gekolegoj Frank kaj Frank-Barandovská/Maitzen, Holdgrün kaj Minnaja, Maitzen kaj Pennacchietti okazu samtempe. Tiel maksimume tri kursoj estos paralelaj. La kurso de kol. Frank okazu prefere en la tempointervalo 8:00 - 9:30.

Surloka propono de la prezidanto por la forumo planita por la merkreda vespero en Rimini estis diskuto pri „Strategia plano 2020 por racia solvo de la lingvaj problemoj en la Eŭropa Unio kaj la scienca mondo".Findecido pri la temo okazos kiel kutime dum la koncerna SUS.

La horaro por kutimaj kunsidoj kaj oficialaĵoj similu tiun de antaŭaj jaroj (malfermo, fermo k.a.), ankaŭ dum la vendredo (la 3an de septembro). Kaze de malmultaj finekzamenotoj la sesio povus esti fermita jam antaŭ la 14a horo. Laŭ bezono la kunveno de la Ĝenerala Asembleo povas okazi parte jam dum la studadsemajno, tamen sen balotado por la nova senato.

Kolego Minnaja konfirmis la lueblon de la salono en Grand Hotel (RSM) por la ekzamentago de la studadsesio. La lupago estas probable pagenda el la ĝenerala buĝeto de AIS.

La senata sekretario distribuis la aliĝilojn por la 21a SUS lige al la 6a itala studadsesio ankaŭ dum la 20a SUS en Bydgoszcz. La senato konstatis la abundan kursaron ofertitan dum la 20a SUS, eĉ se nur parto konsistigis (krom)SUSkursojn. Ankaŭ ĝojigis granda partoprenantaro, kiu povis sekvi la programon en la ampleksaj prelegejoj de la Kujavia-Pomerelia Centro de Ekologia Edukado ĉe Bydgoszcz, por tia aŭskultantaro pli taŭgaj ol la ĉambretoj en la AIS-klerigejo „Monda Turismo". Montriĝis tamen la bezono havi surlokan disponejon de teknika ekipaĵo por kursprezentado. Krome, estus tre dezirinde kunlabori kun la loka altlernejo laŭ starigebla interkonsento.

8. *Prezidanta ofico / PrezO (Frank)*
Post la sekcikunsidoj okazintaj dum la SUS20 al la senato alvenis la jenaj alvokproponoj: el la humanistika sekcio: s-ro A. Sudoł prof. dr. hab. (PL) estu alvokita al AProf. en la fako historio, kio estos realigebla nur post la laŭregula minimume trimonata aparteno al la ISK; el la naturscienca sekcio: kol. Quednau prezentis peton alvoki ASci. dr. habil. Lechowski al PDoc. pri biometrio kaj biofiziko. Kun 4 kontraŭvoĉoj la senato ne povis surloke pozitive respondi la proponon, pri kiu poste estu pridemanditaj la ne ĉeestintaj senatanoj;

el la morfoscienca sekcio:

la senato, transpreninte la taskojn de la sesa sekcio (vidu sub p.11/VicO), pridiskutis ĝian situacion kaj konstatis, ke kompare kun la rapide grandiĝinta nombro de studentoj kaj tiel potencialaj kandidatoj de AIS en la morfoscienca sekcio (kiel sekvo de la loka klerigejo de AIS, nome Monda Turismo) estas klare sentebla manko de efektivaj membroj en tiu sekcio, kiuj - ĉefe surloke - povus gvidi la studentaron. Montriĝis la neceso rapide aktivigi almenaŭ la ĝisnunajn anojn de la sekcio.

Rezulte de tiu ĉi sekcikunsido la senato anoncis la jenajn alvokojn: ADoc. A. Kowalczyk prof. (PL) estu alvokita kiel AProf. sub la kondiĉo, ke antaŭ la komenciĝo de SUS21 en Rimini ŝi plenumos la lastan alvokokondiĉon por tiu ĉi titolo, nome publikigos artikolon en ILo. Kiel ADoc. estu alvokitaj

ASci. Ligeza (en la fako folkloriko) kaj la orda profesoro en la naturscienca sekcio Mielcarek. Kun bedaŭro la senato konstatis, ke s-ino T. Nemere ankoraŭ ne apartenas al ISK.

Krome la prezidanto proponis alvoki ADoc. Dr. Poláková kaj ADoc. Dr. Lobin (ambaŭ ĝis nun en la 1a sekcio) kiel ASci. en la sesan sekcion, kion la senato akceptis. La alvokitoj serĉu ĝis SUS21 la eblecon plifortigi la sekcion. Se fine de aŭgusto tio evidentiĝos ne realigebla, la prezidanto atentigis, ke oni devos eventuale eĉ likvidi la morfosciencan sekcion kaj nuligi la kontrakton kun la ĝisnuna klerigejo de AIS en Pollando.

Oni rememorigis, ke por aprobi alvokon al efektiva membro la dekanoj de la koncernaj sekcioj devas liveri alvokoproponon - skribitan de plenrajta membro - al la prezidanto, kiu kontrolu la plenumitecon de la alvokokondiĉoj.

Al la senato alvenis letero de ADoc. Mag. A. Lewanderska-Quednau kun aldonitaj folioj de kunsido de la 6a sekcio okazinta dum BUS (majo 1998) en Bydgoszcz (PL). En ili la senato estas petita:

a) alvoki kol. ADoc. Mag. A. Lewanderska-Quednau al PDoc. La senato konstatis, ke la propono ne estis pritraktebla pro neplenumo de formalaj kondiĉoj, kaj devis rifuzi ĝin pro manko de decidbazo ne enirante diskuton pri la scienca kvalito de la persono.
b) alvoki PDoc. Dr. habil. Barandovská-Frank al AProf. en la dua sekcio. Ankaŭ en tiu kazo la senato konstatis formalajn mankojn. Cetere, la kandidatino mem jam estis rifuzinta tiun proponon.

9. *Scienc-ofico / SciO (Minnaja, Holdgrün)*
Pro tempomanko kol. Minnaja povis nur mallonge prezenti la aktualan staton de niaj rilatoj kun la registaro de San Marino montrante la leteron ricevitan de la ŝtata Advokata Oficejo, en kiu oni petis AIS kiel privatan asocion prezenti aljuĝatajn de nia akademio diplomojn sen veki la supozon, ke ili estas aŭtomate agnoskataj de RSM. La senato denove substrekis, ke AIS en neniu formo intencas per sia agado konfuzigon kun la ŝtataj institucioj de RSM kaj aprobis la respondproponon preparitan de kol. Minnaja.

Pro la nur marĝena priparolo de la kontaktoj de AIS al la instancoj en RSM, laŭeble per tiu temo estu komencita la venonta senatkunsido.

10. *Struktur-ofico / StukO (NN, Maitzen)*
La prezidanto informis la senaton, ke kol. Grego, la ĝisnuna vicdekano de la morfoscienca sekcio, akceptis transpreni komisiite - ĝis la fino de 1999 - la dekanecon de la sesa sekcio, kio necesis post la morto de ĝia gvidanto, kol. Tyblewski, forpasinta la 1an de decembro 1998.

Monda Turismo (MT), la pola klerigejo de AIS en Bydgoszcz (PL) turniĝis al la senato kun la peto okazigi tie en la venonta jaro (en majo) SUSon. La senatanoj konstatis, ke estus konsilinde doni eblecon okazigi (prov)SUSon en alia loko, kie troviĝas filio aŭ klerigejo de AIS, kaj pro la instrukapacito momente ne eblas aranĝi multajn SUSojn dum unu jaro. La senato rekomendis al MT, organizi venontjare Bakalaŭrigan Sanmarinecan Sesion (BUS), kaj al tiuj studentoj, kiu intencas magistriĝi ĉe AIS, partopreni SUSon aliloke. MT povas ankaŭ uzi la vojaĝeblecon al SUS kiel praktikan sperton por studentoj, kiuj ekzameniĝas en la sesa sekcio pri turismiko. La senato petas organizi eventualan SUSon en la jaro 2001 en la unua semajno de aprilo aŭ tria semajno de julio, t.e. tiam, kiam ankaŭ en okcidentaj landoj estas prelegpaŭzoj, kiuj ebligas kaj al tieaj studentoj kaj al docentoj aktive partopreni la sesion.

Kolego Boĵidar Leonov senpere informis la senaton pri la fondo de AIS-Bulgario. La senato komisiis lin kontakti ŝtatajn instancojn (universitatojn kaj aliajn instituciojn) en sia lando por esplori la eblecojn starigi kontraktojn rilate agnoskon de AIS-diplomoj en Bulgario. Sub la gvidado de s-ro Leonov estu establita AIS-klerigejo en la urbo Karlovo laŭ la modeloj kaj sub la samaj kondiĉoj kiel en Bydgoszcz kaj Moskvo, sendepende de la jam ekzistanta al la klerigejo en Bydgoszcz ligo de la Bulgara grupiĝo kiel konsultejo de Monda Turismo. En la kadro de la starigitaj kaj al li konataj kondiĉoj la senato rajtigis lin tiucele memstare agi.

Kun bedaŭro la senato eksciis, ke Doc.ArS S. Stimec ne povas transpreni komisie la gvidadon de la Arta Sektoro de AIS. Tiu posteno vakas ekde septembro 1998 post la retiriĝo de IAKano C. Frank. Ĝis la fino de la deĵorperiodo de la nuna senato estu petata transpreni la taskon de komisiita direktoro de la ArS IAKanino L. Ligęza.

11. *Vicprezidanta ofico / VicO (Pennacchietti)*
La senatanoj unuanime decidis, ke pro la foresto de ĉiuj efektivaj membroj el la 6a sekcio dum la 20a SUS la taskojn de la sekcio ĝis la venonta SUS (inkluzive decidojn de sekcikunsido) transprenu la senato.

Pro la nuna docentara problemo en la morfoscienca sekcio la senato substrekas nepran kompletigon de ĝi (dekano, membro de la ekzamenofico k.s.), kio okazu plej malfrue ĝis la venonta SUS en Rimini.

12. *Diversaĵoj*
La dato por la venonta senatkunsido ne estis fiksita. Senatkunsido okazu ĉiukaze dum la 21a SUS en Rimini (I) / San Marino Cittá (RSM). La preciza dato estos sciigita en la SUS-programo.

24an de julio 1999/1698pfR - teksto aprobita la 2an de augusto 1999

Protokolis: *Joanna Lewoc, Horst S. Holdgrün* (protokol-oficio)

Protokolo de la 40a senatkunsido (34a post la oficialiĝo de AIS fare de la Konsilio de XII, 43a post la fakta eklaboro) okazinta dum la 84a Universala Kongreso de Esperanto, en la Internacia Kongrescentro (ICC) en Berlin (D) la 3an de aŭgusto 1999 (mardo), 15:30 -- 18:30.

0. *Ĝeneralaĵoj (formalaĵoj, ĉeestrajto, tagordo)*
La kunsidon partoprenis la senatanoj Fößmeier, Frank, Holdgrün, Kiselman, Lewoc, Minnaja, Quednau. La kunsido estis kvoruma. La senatanoj akceptis la antaŭe transdonitan tagordproponon de la prezidanto.

1. *Ekzamen-ofico / EkO (Pennacchietti, Minnaja)*
La senato konstatis, ke post sukcesa finekzameniĝo de ADoc. Fuss dum la 20a SUS en Bydgoszcz bedaŭrinde ne estis surloke preparita la ekzamen-atesto kaj -dokumento pri la akirita grado. Kol. Lewoc en sia kvalito de asistanto de la ekzamen-ofico pretigos la mankantajn dokumentojn por Dr. Fuss, kiuj estos transdoneblaj dum la venonta studadsesio. Estonte la EkO provu transiri al komputila dokumentpreparado.

Por la 21a SUS ŝi informis, ke ĝis nun neniu laŭregulara kandidato anonciĝis. Por la 22a SUS jam estas antaŭvidebla kandidato por adapta adopto de habilita doktoriĝo en la morfoscienca sekcio. Ankaŭ en la jaro 2000 intencas ekzameniĝi (originala doktoriĝo en la filozofia sekcio) anoncinta sin al kol. Quednau interesiĝinto el Litovio. Ŝi estas jam informita pri la necesa antaŭa adapta adopto de sia magistra grado. La senditan leteron kol. Quednau transdonos laŭ indiko de la prezidanto al AProf. Angstl por enhava pritrakto de la kandidatiĝo.

Evidentiĝis, ke gekolegoj Lewoc kaj Quednau paralele kaj sendepende preparas liston de sukcesaj finekzamenitoj ĉe AIS. Post la finpretigo kaj la oficiala diskonigo de ĉiuj registrofolioj okazu publikigo en la interreto.

2. *Financ-ofico / FinO (Wickström, Frank)*
Kol. Frank emfazis malkontenton pri alveninta al AIS pere de li malgrandsuma pago por altigi la servobonhavon de la sendinto, kaj substrekis, ke tio estas tre malefika kaj AIS-interne temporaba pagproceduro; tamen en unuopaj kazoj ĝi momente ne estas pli bone mastrumebla.

La prezidanto rememorigis, ke AIS estas societano en Akademidomaro GmbH [societo kun limigita respondeco], kies ĉefa celo estas starigo de akademi-domoj, ĝis nun sensukcesa. La kapitalo de la societo intertempe senteble malgrandiĝis. La afergvidanto de Akademidomaro GmbH (kaj samtempe estrarano de AIS-Deutschland kaj gvidanto de la Subtena Sektoro de AIS) ASci. Piotrowski dr. intencas aĉeti kontraŭ la restanta kapitalo akciojn de alia firmao. Post mallonga diskuto venis propono - kaze ke starigo de akademidomoj ne estas reale antaŭvidebla - vendi la akciojn de AIS (ekzemple al aliaj societanoj), se la kondiĉoj estas favoraj. Findecido pri tiu punkto estis prokrastita ĝis al la venonta senatkunsido.

La prezidanto informis la senaton pri peto veninta de la privata esplorinstituto pri kemio (ITC) el Bremen (D) fariĝi kolektiva subtena membro de AIS kaj celas akiri la rajton, sin nomi AIS-instituto. La gvidanto de ITC, s-ro S. Milnera, jam apartenas al ISK. La senato principe akceptis la peton rememorante, ke simile jam la instituto pri kibernetiko el Paderborn (D) estis dum kelkaj jaroj ankaŭ kolektiva membro de AIS kun la sama statuso.

Apogiĝante je tio la direktoro de la esplor-ofico kol. Minnaja kiel gvidanto de malgranda komisiono ellaboru regularon, laŭ kiu AIS akceptu tiajn membrojn. La reprezentantoj de la kemia instituto povu konatiĝi kun ĝi dum la venonta SUS.

Kol. Frank informis pri malmembriĝo el AIS de ges-oj Buss. La restinta sumo sur ilia servobonhavo laŭregulare restas ĉe AIS.

3. *Honorad-ofico / HordO (Maitzen, NN)*
Rilate la transdonon de la Premio Pirlot por la jaro 1998 okazis neniu decido. La senato kun bedaŭro konstatis, ke ne venis senpere aŭ pere de kol. Maitzen propono de inda kandidato.

4. *Identec-ofico / IdeO (Frank, NN)*
Kol. Frank akceptis proponon de gekol. Lewoc kaj Minnaja, ne ligi la malfermon de la venonta sesio en Rimini kun la administra parto. Decido pri maniero kaj okazigo de la formalaj oficialaĵoj dum estontaj SUSoj estas prokrastita.

5. *Inform-ofico / InfO (Fößmeier, Maitzen)*
Kol. Frank anoncis, ke de s-ro Haupenthal venis peto ricevi informojn pri AIS. La prezidanto respondu la leteron sciigante, ke ĉiuj esencaj informoj pri la akademio estas jam publike alirebaj en la interreto.

6. *Klerig-ofico / KleO (Quednau, Fößmeier)*
La dissendado de la broŝuro pri Eŭropo de kol. Frank okazu nur en la nomo de alia asocio aŭ de la aŭtoro.

Dum la Universala Kongreso de UEA en Berlin okazis AIS/IKU-sesio, laŭ la subskribita en 1997 kunlaborkontrakto inter AIS kaj UEA. La sesion konsistigis du kursoj kaj la prelegaro, kaj ĝi fariĝis - laŭ sinsekvo - la 11a germana kaj la 4a internacia AIS-studadsesio.

7. *Protokol-ofico / ProtO (Lewoc, Holdgrün)*
La senatanoj trarigardis la antaŭe dissenditan version de la 39a senatprotokolo el Bydgoszcz kaj akceptis ĝin kun kelkaj aktualigoj kaj ĝustigoj

La senato ankaŭ akceptis la perrete de kol. Lewoc dissenditan horaron de la 21a SUS, same kiel - pro la subita aliĝo al la sesio de pluraj latinistoj - la proponon okazigi latinan simpozion. La kurso, kiun en ĝia kadro ofertas gekolegoj Barandovská-Frank kaj Maitzen, estu valida kiel krom-SUS-kurso.

Dum la 84a UK, al kiu aliĝis ĉ. 2700 personoj, la Senata Sekretario distribuis aliĝilojn kaj informfoliojn pri AIS kaj pri la komenciĝonta fine de aŭgusto ĉi-jare lasta SUS (en Rimini kaj San Marino).

La senato akceptis peton de docento d-ro. Martin Bilek transdonitan al la senato pere de kol. Frank okazigi en Hradec Kralové (Ĉeĥio) la venontan (22an) SUS dum la pentekosta semajno de la jaro 2000.

Kol. Lewoc transdonis al la prezidanto kopiojn de la senatprotokoloj ekde la ekesto de la akademio ĝis al la senata deĵorperiodo 1996-1999. La protokolo de la 40a kaj la fina protokolversio de la 39a senatkunsido estos distribuitaj, resp. liveritaj por publikigo en la 3a semajno de aŭgusto 1999.

8. *Prezidanta ofico / PrezO (Frank)*
La prezidanto informis la senaton, ke ISKano Viereck prof., kies adreso estas intertempe konata, plenumis ĉiujn kondiĉojn por esti alvokita kiel AProf. La senato kun la plejmulto de la voĉoj akceptis tiun rangoplialtigon proponitan de kol. Frank.

Rilate la alvokon de Dr. habil. Lechowski kiel PDoc. en la natursciencan sekcion okazis revoĉdonigo (vd. 39an senatprotokolon). Kun du kontraŭvoĉoj el ses la siatempa alvokopropono de kol. Quednau estas akceptita.

La ripetitan proponon de kol. Frank alvoki ADoc. Dr. Poláková kiel AProf. pri etnografio kaj ADoc. Dr. Lobin kiel AProf. pri eŭrologio en la morfosciencan sekcion la senato, ankaŭ en sia rolo kiel taskplenumanto de la morfoscienca sekcio, akceptis kun la plejmulto de la voĉoj.

9. *Scienc-ofico / SciO (Minnaja, Holdgrün)*
Nenio pritraktita

10. *Struktur-ofico / StukO (NN, Maitzen)*
Nenio pritraktita

11. *Vicprezidanta ofico / VicO (Pennacchietti)*
Nenio pritraktita.

12. *Diversaĵoj*
La venonta senatkunsido okazos en Rimini (I) dum la 21a SUS lige al la 6a itala studadsesio. La preciza dato estos sciigita en la SUS-programo.

Protokolis: *Joanna Lewoc, Horst S. Holdgrün* (protokol-ofico)

Je 13.08.1999

Kommunikations-kybernetisches Schrifttum

zur Vervollständigung Ihrer (eigenen oder öffentlichen) Bibliothek lieferbar durch den Verlag der

Komunikad-kibernetika literaturo

por kompletigi vian bibliotekon (privatan aŭ publikan) ricevebla pere de la eldonejo de la revuo

Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft (GrKG) / Humankybernetik

Bei Titeln mit verschiedensprachigen Texten sind die Sprachen nach abnehmendem Anteil genannt.

Kaze de verkoj kun diverslingvaj tekstoj la lingvoj estas indikitaj laŭ malkreska uziteco.

Dans le cas d'oeuvres avec des textes en plusieurs langues, celles-ci sont indiquées selon fréquence d'utilisation décroissante.

In the case of publications with texts in several languages, these are mentionned in the order of decreasing use.

Eine sofortige Lieferung sichert Akademia Libroservo p.a. IfK/Verlag zu. Von dort erhalten neue Bezieher der Zeitschrift GrKG/H vorangegangene Jahrgänge zum halben Preis.

Tujan havigon garantias Akademia Libroservo p.a. IfK / Verlag. Ĝi havigas al novaj abonantoj de la revuo GrKG/H duonpreze pli fruajn jarvolumojn.

Akademia Libroservo p.a. IfK/Verlag vous garantie une livraison immédiate. Les nouveax abonnés à la revue GrKG/H reçoivent une réduction de 50% sur les volumes parus.

Akademia Libroservo p.a. IfK/Verlag offers an immediate sending. New subscribers of the revue GrKG/H can receive there the volumes of earlier years at half price.

Autor und Titel / *aŭtoro kaj titolo* / auteur et titre / author and titel	**DM**
Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft (GrKG)/Humankybernetik. Vol. 1997 etc. (Deutsch, ILo, English, français). ISSN 0723-4899. **Jahresabonnement**/*jarabono*/per anno	80,-
GrKG / Humankybernetik, vol. 1960 - 1996. ISSN 0723-4899 **Je** / *po* / à	40,-
Internacia Sciencista Dokumentaro 1996 - 1999 / AIS San Marino.	15,-
Internacia Sciencista Dokumentaro 1992 - 1995 / AIS San Marino.	5,-
AIS: *Acta Sanmarinensia Academiae Scientiarum Internationalis* Vol. I - III. (ILo, Deutsch) ISBN 3-88064-180-3 ... **Je** / *po* / à	21,-
Meder / Schmid: *Kybernetische Pädagogik.* Vol. 1 - 5. (Deutsch, espagnol, français, English, etc.) ISBN 3-17-001272-X ... 3-17-001846-9. **Je** / *po* / à	24,-
Barandovská: *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko.* Vol. 6 - 7. (Deutsch, ILo, français, italiano, English) ISBN 80-85586-05-3, 3-929853-01-9 **Je** / *po* / à	69,-
Lánská: *Kybernetische Pädagogik / Bildungsinformatik.* Vol. 8 - 9. (Deutsch, English, česky, etc) ISBN 80-901335-4-1, 80-85835-07-8 **Je** / po / à	58,-
Barandovská: *Kybernetische Pädagogik/Klerigkibernetiko* Vol. 10 (Deutsch, Ilo) ISBN 80-85853-35-3, 3-929853-08-6	78,-
Lobin / Bink: *Kybernetik und Bildung / Kibernetiko kaj Klerigo.* Vol. I - IV. (Deutsch, ILo) ISBN 3-506-76208-7 ... 3-506-76212-5. **Je** / *po* / à	10,-
Lobin / Bink: *Kybernetik und Bildung / Kibernetiko kaj Klerigo* Vol. V. (Deutsch, ILo) ISBN 3-929853-00-0	18,-
Maxwell: *Lingvo kaj Kibernetiko / Language and Cybernetics / Language et Cybernétique / Limba si Cibernetica.* (ILo, English, français, Romana) ISBN 80-85853-03-05	20,-
Krause / Piotrowski: *Bildungskybernetik und Europäische Kommunikation / Klerigkibernetiko kaj Eùropa Komunikado / Educational Cybernetics and European Communication.* (Deutsch, ILo, English) ISBN 80-85853-00-0	24,-
Lánský / Fialová: *Bildungskybernetik in Forschung und Lehre.* ISBN 80-85853-01-9	21,-
Piotrowski: *Kybernetische Ursprünge der europäischen Bildungstechnologie / Kibernetikaj fontoj de la eùropa klerigteknologio.* (Deutsch / ILo/English) ISBN 3-929853-04-3	15,-

Schick: *Kommunikation mit Rechnern / ohne Rechner / durch Rechner.* (Deutsch, français, ILo) ISBN 3-8080-0193-3	9,-
Weiss et al.: *Psychogenetik der Intelligenz / Psychogenetics of Intelligence / Psikogenetiko de la Inteligenteco / Psychogénétique de l'Intelligence.* (Deutsch, English, ILo, français) ISBN 3-8080-0106-2	9,-
Frank: *Vorkurs zur prospektiven Bildungswissenschaft / Propedeŭtiko de la Klerigscienco Prospektiva.* (Deutsch, ILo) ISBN 3-8080-0307-3	15,-
Selten / Pool: *Enkonduko en la Teorion de Lingvaj Ludoj / Einführung in die Theorie sprachlicher Spiele.* (ILo, Deutsch, English, Italiano, po polsku) ISBN 3-929853-03-5	39,-
Frank / Yashovardhan / Frank-Böhringer: *Sprachkybernetik / Lingvo-Kibernetiko.* (ILo, Deutsch) ISBN 3-87808-577-X	24,-
Behrmann / Stimec: *Bildung und Berechnung / Klerigo kaj Prikalkulado.* (ILo, Deutsch). ISBN 3-88064-072-6	18,-
Jung et al.: *Wörterbuch der Internationalen Sprache / Vortaro de la Internacia Lingvo.* (Deutsch / ILo) ISBN 3-88064-074-2	15,-
Lobin et al.: *Muß Europa an der Sprachenvielfalt scheitern?*	15,-
Bormann / Frank: *Für Europas Mehrsprachigkeit -Ein Streit um Argumentge / Por plurlingveco de Eŭropo - Disputo pri argumentoj.* (Deutsch, ILo) ISBN 3-929853-02-7	22,-
Frank-Böhringer/Schopenhauer: *Rhetorische Kommunikation.* (Nachdr.) ISBN 80-901335-5-X	15,-
Englert et al.: *Lexikon der kybernetischen Pädagogik und der programmierten Instruktion.* (Nachdruck) (Deutsch, English, francais, po russki) ISBN 80-901335-7-6	18,-
Frank: *Mallonga enkonduko en la kibernetikan pedagogion* (ILo, Deutsch) ISBN 80-901335-9-2	18,-
Frank: *Kybernetische Grundlagen der Pädagogik.* (Nachdruck) ISBN 80-901335-6-8	18,-
Frank: *Informationsästhetik/Kybernetische Ästhetik/Informaciestetiko,* ISBN 3-929853-06-x	18,-
Frank: *Klerigkibernetiko / Bildungskybernetik* (ILo, Deutsch) ISBN 3-929061-81-3	24,-
Frank/Franke: *Estetika informacio/Ästhetische Information* (ILo, Deutsch) ISBN 3-929061-81-1	24,-
Frank/Lobin: *Sprachorientierungsunterricht/Lingvo-Orientiga Instruado* (Ilo, Deutsch) ISBN 3-929061-83, 80-967425-3-1	26,-
Lobin/Lohse/Piotrowski/Poláková: *Europäische Kommunikationskybernetik heute und morgen.* ISBN 80-85853-38-8, 3-929061-83-5	24,-
Frank: *Meine Mini-Memoiren / Miaj Mini-Memoraĵoj* (Deutsch/Ilo) 129 S.	18,
Barandovská: *Eŭropa Kalendaro / Fasti Europenses 1999/2000* (Ilo, Latein, Deutsch u.a.) 106 S. ISBN 3-929853-09-4	10,-
Frank: *Europa so – oder besser? Anstöße zu Diagnose und Therapie.* 64 S. ISBN 3-929853-10-8	4,80
Pinter: *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko. Vol. 11* (Deutsch, ILo, English, français) XX + 1164 S. ISBN 3-929853- 11-6 (Subskr. < 1999-09-25 : 50,- DM)	**98,-**

Neuerscheinung September 1999 - Einladung zur Subskription:

Pinter, A.-M. (Hrsg.): *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko.* Band 11: Schriften 1977 – 1998 von Helmar Frank und Mitarbeitern. XX + 1164 S. Festeinband, Fadenheftung.

Diese Fortsetzung der 1973 von B.S.Meder und W.F.Schmid begonnenen Quellensammlung kommunikationskybernetischer, insbesondere informationspsychologischer und bildungskybernetischer Texte enthält vor allem Nachdrucke der Buch- und Zeitschriftenveröffentlichungen, die von H.Frank (als Autor oder Mitautor) in den Jahren 1993 – 1998 erschienen, sowie drei frühere, in Band 6 fehlende Texte. Angefügt sind u.a. eine Dokumentation der Beiträge des Instituts für Kybernetik zur Bildungsmedienentwicklung, Würdigungen und Register. Zusammen mit den noch lieferbaren Bänden 1 – 3 und 5 – 7 liegt damit eine vollständige Schriftensammlung des Autors bis 1998 vor. – Bei Eingang von Bestellung (mit Lieferadresse) und Zahlung (Konto Nr. 8821960400 Volksbank Paderborn, BLZ 47260121) vor dem 25. September 1999 beim Verlag der GrKG/Humankybernetik erhalten Bibliotheken und Einzelinteressenten das Buch zum Subskriptionspreis von **DM 50,-** einschl. Versandkosten.

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 – 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.